Tiu sistemo staras ekvilibre en spaco. Kio subtenas ĝin? Forto nevidebla. Tiu mistera forto, nomita altirforto universa, regas ĉirkaŭ la centra astro tutan sistemon sunan: planed-ojn, kunulojn, asteroidojn, kometojn, meteor-ojn, ĉiujn estajojn, kiujn lumigas suno. Sama forto, desegnas orbiton cirklan, kiun trairas tero ĉirkaŭ suno; sama forto estas kialo de senfina kurado de kunuloj ĉirkaŭ iliaj planedoj. Ĝi ankaŭ firmiĝas sur tero la paŝojn de homo kaj de besto, la flugadon de birdo tra aero kaj la naĝadon de fiŝo en akvo; ĝi direktas la movojn de atomoj dum la nevideblaj ali-formiĝoj de mondo organika kaj neorganika; fine ĝi regas, en la nekalkuleblaj profundaĵoj de universo, la movadojn de ĉiuj stelaj sistemoj.

Tiel en naturo ĉiuj fenomenoj estas ligitaj unu al alia per povo de universaj leĝoj, sama forto regas kaj viviĝas milojn kaj milojn da sunoj kaj estajoj.

Sistemo suna moviĝas kun rapideco de 8 km. po sekundo, 240.000.000 km. po jaro. Kia ajn estu ĝia vojiro, ĝi povus senfine fali, neniam ĝi ektuŝus fundon de senlimo.

Do ni vidas klare, ke ĉielo de antikvaj temp-oj ne ekzistas, estas nur spaco senlima, tra kiu promenadas tero, kiel ĉiuj astroj.

(Fino).

## LIBERA TRIBUNO. Pri Centra Esperanta Organizo.

La samtitola artikolo presita en nia Januara N-ro elvokis ĉi suban diskuton:

Nia majstro, ĉiam zorgema pri estonteco de Esperanto, ĉe la malfermo de la Antverpena kongreso proponis apogi nian ekziston kaj agadon sur bazo firma kaj konstanta, sur kiu apogas sian ekziston ĉiuj civilizitaj regnoj kaj asocioj; sur volo de tuto, sur volo de tuta esperantistaro. Alic—la majstro proponis parla-

menton kun regula kaj rajtigita kongresa voĉdonado.

Ne ĉiuj lin bone komprenis.

„Mardon, 22-an, skribas s-ro Era, korespondanto de „Lingvo Internacia“ en N-ro 8—9, la diskutado komenciĝas iom konfuze. S-ro Laman: petas, ke oni ne voĉdonu per manoj levitaj. Ĉar li reprezentas pli ol 19 delegitojn kaj tute ne povas levi 19 manojn. Ankaŭ ali-aj parolas pri la sama afero, murmuroj fariĝ-

as bruo, bruo fariĝas tumulto, kaj pli kaj pli kunsido memorigas pri la naciaj parlamentoj, sed oni povas aserti, ke la tuta esperantistaro decidis voĉdoni per delegitoj.

Jen la unua paŝo estas farita\*

Farita estas ankaŭ la dua kaj la tria paŝo: penis defini, kio estas delegito kaj diskutis pri la tagordo de la kongreso kaj pri akceptotaj proponoj.

„De nun la esperantistaro posedas rajtigitan delegitaron“, sed laŭ opinio de la korespondanto, „nuna metodo elekti delegitojn ne liveras veran opinion de la tuta esperantistaro“.

Oni decidis elekti komision, kiu studos la tutan demandon kaj publikigos sian raporton, almenaŭ tri monatojn antaŭ la 8-a kongreso, en la „Oficiala Gazeto“.

S-ro Mudie diris, ke li ne estis partiano de la nova situacio; li ĝin akceptis, ĉar la plimulto ĝin volis. Tamen, kiel prezidanto de U. E. A., li ial povis timi, ke eble la projektata organizajo konkurencos lian jam de longe ekzistantan kaj potencon societon. Sed li deklaras, ke se tion postulos la ĝenerala utilo, li estas preta nuligi U. E. A...

S-ro Cart, redaktoro de „Lingvo Internacia“ ĉiam malkaŝe sin montris malamiko al la ideo de rajtigita delegitaro kaj postulas garantian, ke la „Parlamento“ ne enmiksos sin en lingvajn demandojn, nek rekte, nek per lerta kaj tendenca organizado de la Lingva Komitato, ke ĝi ne volos ŝanĝi la lingvon de la Fundamento.

„Ĉu vi kredas, ke la „Parlamento“ al ni proponata reprezentos la Esperantistaron, la Esperantistan popolon? Ne, certe ne! Nur tiujn ĉi reprezentos la „Parlamento“, kiuj donacis difinitan kotizon al Centra Oficejo, tute egala, ĉu ili scipovas la lingvon, aŭ ne, tute egale, ĉu ili estas plibonigistoj, reformemuloj, pli malpli kaŝitaj idistoj, se nur ili estas enskribitaj ĉe ia grupo!“

La plej fervora partiano de rajtigita delegitaro s-ro Michaux, kiam en la voĉdono oni ne faris kalkulon de voĉoj, oni ne voĉdonis pri demando de la grupo *Unua kongreso* kaj protokolisto rifuzis konigi tekston de ĝia protesto. En letero al s-ro Era s-ro Michaux skribas:

„Mi sonĝis pri parlamento, kies deputatojn la popolo elektos, kie la deputatoj mem elektos sian estraron, kie la prezidanto plenumas sian senpartian rolon, siajn promesojn, kie oni sekvas la tagordon; sed mi rifuzas nomon de parlamento al ia ĉeestantaro regata de aŭtokrataj ne deputataj... La grupo *Unua kongreso* estis sufiĉe ofendita por forlasi la aktorojn de tia komedio. Oni neniam revidos ĝiajn delegitojn, ĉar ĝi decidis unuvoĉe protesti per disigo“...

Oficiala organo de U. E. A. „Esperanto“ en N-ro 112 skribas:

„Por atingi harmonian organizon de la Esperanto — movado, ni ne bezonas krei novajn organismojn, kiuj povus nur pligrandigi la nunan konfuzon, sed nur kunligi tiujn, kiuj ekzistas...“

La reprezentado de la Esperantistaro estos duobla:

a) Reprezentado de la esperantistoj kiel individuoj, per la delegitoj de U. E. A.

b) Reprezentado de la esperantistaj propagandaj organizajoj per la reprezentantojn. Memkompreneble, la nomo estas negrava: oni povas elekti alian, se tiu ŝajnas ne taŭga. Tiuj reprezentantoj estos elektataj de la naciaj propagandaj societoj kaj de la fakaj organizajoj, proporcie je la nombro de iliaj membroj. Oni ekz. povus elekti unu reprezentanton por 250 membroj. La delegitoj kaj reprezentantoj havus egalajn rajtojn. La voĉdonoj kaj balotoj estos ĉiam korespondaj kaj sekretaj — necesa garantio por ĉiu serioza demokrata organizo.

La kongreso ekzamenos tion, kio estas farita dum la jaro kaj laŭ la raporto, kiuj estas prezentataj al ĝi, esprimas dezirojn pri tio, kio estas farota dum la venonta jaro, lasante al la komitato helpata de la specialaj komisioj la taskon ellabori la regularojn de la diversaj servoj sub rezervo de la aprobo de la delegitoj kaj reprezentantoj.

La sperto montris, ke kongreso, kiu kunvenas nur dum kelkaj tagoj, ne povas detale diskuti regularojn kaj serioze pritrakti demandon sub ĉiuj ĝiaj aspektoj; ofte ĝi eĉ ne estas kompetenta por tio, kaj tial sisteme akceptas ĉion, kion oni prezentas al ĝi, se nur ĝi estas lerte prezentata. Poste kompreneble naskiĝas protestoj. Pli proksima al demokrateco kaj ankaŭ pli ĝusta estas la sistemo, laŭ kiu la lasta instanco estas la delegitoj kaj reprezentantoj voĉdonantaj hejme post interŝanĝo de ideoj kun siaj samlokaj samideanoj anstataŭ rapide dum kongreso post pli-malpli brila parolado“.

Kiom la lasta opinio, esprimita en „Esperanto“ de ĝia direktoro, estas ĝusta, pruvas senĉesa kaj ĝis nun daŭranta en esperantista gazetaro diskutado kaj polemiko pri la tuta preparolata demando. Pravas ĝin ankaŭ kaj presita en „Esperanto“ letero de s-ro Peyraud, kiu skribas:

„La demando pri la organizo de la esperantistaro estas gravega kaj oni devas ĝin pritrakti serioze. Ĝia amplekso kaj graveco postulas atentan preparadon kaj studadon de ĉiuj naciaj kaj regionaj societoj esperantistaj. Ŝajnas al mi, ke oni agis ion tro rapide, decidante pri tio en Antverpeno sen ia studado de ĉiuj interesatoj. La multaj protestoj jam faritaj montras efektive, ke tiuj decidoj ŝajnas ne sufiĉe maturaj. Laŭ mi, tiu demando bezonas esti pridiskutita dum tiu jaro, sed de la naciaj kaj regionaj societoj, kiuj povus tiamaniere eldiri la ĝustan kaj veran opinion de

siaj grupoj demanditaj per referendumo aŭ en kongresoj. Estas evidente, ke la antverpena kongreso ne povas ligi ĉiujn esperantajn grupojn sed nur reprezentitajn, kies nombro estas malgrava parto de nia samideanaro. Povas okazi, ke tiu respondo estos konforma al la decidoj de la 7-a, sed tre certe la grupoj per tiu ĝenerala konsulto povos elmeti ideojn aŭ modifikaĵojn tre utilajn al nia esperantistaro“...

S-ro L. Lamant opinias,

„Ke en Antverpeno oni preterpasis la celon de D-ro Zamenhof. Kion li deziras? Laŭ liaj klarigoj, lia projekto neniel celis organizi internacie la esperantistaron. D-ro Zamenhof ne parolis en sia projekto pri Internacia Organizaĵo. Lia deziro estis elektigi ĉiujare delegitojn, kiuj alportus al la universala kongreso la opinion, la volon, la postulojn de la preskaŭ tuta esperantistaro. Tiu kreo iom ŝmilus niajn antikvajn francajn „Etats Généraux“ Tiele prezentita tia propono, kvankam por multaj senutila, estis akceptebla. Bedaŭrinde oni tute aliformigis ĝin. Pri demando de kotizajo, kiel pri ĉiuj aliaj, oni diskutis en Antverpeno senorde kaj konfuzo. Komprenoble estas, ke al tiaj senordo, konfuzo, ĥaoso povas rezulti nur malbonaĵoj“.

„Le Monde Esperantiste“ en artikolo subskribita M. E. prezentas subajn konsilojn:

I. Ne pagi kotizajon al Centra Oficejo, kies prezidanto longe korespondadis pri reformoj kun la idistoj.

II. Postuli voĉdonrajton ankaŭ al nepagintaj la imposton.

III Alprenigi en la tagordon de la kongresoj ĉiun proponon de Grupo aŭ de areto de delegitoj 10 ĝis 20, ĉar la nombro 100 estas neatingebla.

IV. Ne permesi, ke la kongreso alprenu decidojn, sed nur deziresprimojn subnotitajn al la posta sankcio de ĉiuj grupoj, ĉar multaj grupoj ne povas sendi delegitojn al la kongreso kaj tiam iliaj deziroj ne estus konsiderataj.

V. Forigi la oficialecon de Centra Oficejo.

VI. Ne kateni per alia kreo la liberecon de Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio.

VII. Permesi, ke la Akademio ricevu monon.

VIII. Malebligi la oficialan starigon de ĉiu alia organizaĵo.

S-ro C. Bourlet kulpigas kelkajn gazetojn, kiel *Lingvo Internacia*, *Danubo kaj Le Monde Esperantiste*, pro ilia batalado kontraŭ la projektata organizaĵo de la esperantistoj. Kaj s-ro L. L... en la „Monde Esperantiste“ plendas, ke la Dio de Esperanto estas s-ro Bourlet, kion ĉiuj ja scias. Antaŭ kelkaj jaroj nia samideano Michaux lin nomis „l'Empereur Carlo I-er“ „s-ro Bourlet modeste preferas esti Dio.“

La ĉiuj supre cititaj opinioj montras, ke la proponita parlamenta delegitaro, ĝoje de la plimulto akceptita, ne al ĉiuj tamen plaĉis, limigante ilin. Anoj de U. E. A. timas, por ke oni ne komprenu malbone la proponon kaj ke mi ne penu aranĝi ian novan internacian organizaĵon, konkurantan kun jam ekzistanta, prospere

funkcianta kaj tre fruktodona kaj utila por Esperanto U. E. A. Ilia timo, kredeble ĉesos baldaŭ, kiam post necesa diskuto kaj klarigo evidentiĝos, ke nenia nova internacia institucio por ia ekstera agado estas celata, sed kiel la majstro mem eldiris en sia kongresa parolado nur celata estas plej ĝusta „maniero“, per kiu la tuta esperantistaro povu esprimi sian opinion kaj volon, kaj plejbone konservi sian ekzistadon kaj organizismon.

La aliaj, kun la eminenta pioniro de Esperanto, s-ro Cart, redaktoro de „Lingvo Internacia“, pli ĝuste timas, por ke la proponata organizaĵo ne obliĝu al la idistoj aŭ al la homoj al ili similaj, ne utilon kaj bonon de Esperanto, sed sian nur profiton kaj iajn kaŝitajn intencojn celantaj, ree ataki la lingvon aŭ alie, mallice kaj ruze, fari malutilon al Esperanto.

Antaŭ pli malpli dek jaroj ni havis ekzemplon en Krakova Akademio de Sciencoj, ke pri lingvaj demandoj ne povas decidi homoj nekompetentaj, eĉ se ili estas membroj de la Akademio kaj eĉ se forestas iaj kaŝitaj tendencoj. Decido de la elektita el membroj nekompetentaj komisiono pri ortografio en lingvo pola ne estis de nacio akceptita—faris fiaskon.

Tial ne estas mirinde, ke s-ro Cart proklamas *caveant consules* kaj deziras garantion de la Bolonia deklaro.

Konflikto okazebla inter volo kaj povo de la rajtigita delegitaro kaj inter la Bulgonia deklaro embarasas ankaŭ rektoron de la universitato en Dijon prezidanton de Lingva Komitato s-ron Boirac, kiu, laŭ Monde Esperantiste, unufoje opinias, ke oni devas lasi al la kongresoj liberajn decidojn pri reformoj, se ili farigos necesaj en estonteco,— kaj alfoje diras, ke la organizaĵo de rajtigitaj delegitoj por la kongresoj ne tuŝas la sendependecon de la Lingva Komitato.

Ili ambaŭ sendube scias, ke leĝoj homaj ne estas eternedaŭraj, kaj tial oni devas zorgi, ke ili ne estu almenaŭ anstataŭataj per la plimultonaj aŭ antaŭtempaj. Sed estas mirinde, ke nek ili, nek iu alia penis dum la kongreso nek poste serĉi rimedon kontraŭ suspektata danĝero, ne rifuzante la tutan proponatan organizaĵon.

La saman, eĉ pli multe komplikitan, situacion prezentas ja ĉiuj politikaj parlamentoj, aranĝitaj de homoj plej lertaj kaj antaŭvidantaj. Tiuj parlamentoj povas esti por ni modeloj. En ili decido de la parlamenta plimulto por akiri leĝan [povon bezonas aprobon de institucio nomata diverse en diversaj landoj, ĉe

ni—nomata Stata Konsilantaro. Tiu institucio plej ofte moderigas tro radikalajn kaj reformemajn aŭ antaŭtempajn decidojn de parlamenta delegitaro. Eĉ en Nova Zelando, plej libera kaj plej demokrata respubliko en tuta mondo ankaŭ ekzistas ĉe parlamento tiu ĉi institucio.

Ĉar la tuta nia agado rilatas senpere nur Varsovio.

la lingvon, nia Lingva Akademio povus esti ĉe ni la institucio, kies aprobo estus necesa, por ke la decidoj de rajtigita delegitaro ricevu leĝan povon. Tiamaniere, ne rifuzante la tutan proponon, oni povus kontentigi preskaŭ ĉiujn.

Do, konsideru tion delegitoj dum Krakova Kongreso!

Kazimierz Wasilewski.

## Oka Universala Kongreso Esperantista.

**Dua cirkulero, oficiale komunikita. Januaro 1912.**

La sukceso de ĉiu kongreso dependas ne nur de ĝia organizo, sed, ankaŭ de la nombro de parteprenantoj. Laŭ la nuna stato de avizitaj aliĝoj oni povas esperi, ke la Oka arigos multe da ĉiulandaj esperantistoj, kiuj per sia partopreno deziras honori la Majstron kaj lian grandiozan verkon. Kalkulante laŭ la nacioj, oni konstatas, ke inter la ĝisnunaj aliĝintoj, la unua loko apartenas al Poloj kaj Germanoj, ĉar la unuaj atingis iom pli, la aliaj iom malpli, ol 40% da nunaj aliĝoj. Certe tiu proporcio poste ŝanĝiĝos, sed supozeble la polaj samideanoj ĉi-okaze havos en la Kongreso procente konsiderindan reprezentantaron.

*Aliĝoj.* Ĉar diversaj detaloj, kiujn oni kutime publikigas en la definitivaj aliĝiloj, ankoraŭ ne estas ĝis tia grado prilaboritaj, ke oni povus jam nun eldoni definitivajn aliĝilojn, la Komitato presigis nekompletajn aliĝilojn, kiuj estis dissenditaj al ĉiuj ĝisnunaj aliĝintoj kaj al kelkaj pli gravaj gazetoj.

Post interkonsento kun K. K. K. oni fiksas la kongresnan kotizajon je 6 Sm.

Dezirante tamen plifaciligi la partoprenadon al tiuj personoj, kiuj intencas veni Krakovon kun sia familio, la Komitato starigis jenan

regulon: Familianoj (edzino kaj infanoj) kune venantaj kun la famiilestr(in)o pagas nur 3 Sm kaj ricevas t. n. suplementajn kongreskartojn, sed la Kongresajn dokumentojn ricevas sole la famiilestr(in)o.

Ricevinte la plenigitan aliĝilon kune kun la necesa mono, la Komitato tuj sendas provizoran kongreskarton kun definitiva numero.

La karto kun Nr. 1 estas „aŭkcia objekto“, ĉar ĝin ricevos tiu kongresano, kiu ĝis la 1-a de majo oferos por ĝi plej multe.

*Loĝado.* La urbestro, kiu disponas riĉan kaj fidindan materialon, koncernantan loĝejojn por trapasantaj turistoj, donis ĝin al la loĝiga sekcio de la Kongresa Komitato. Ĉar la laboroj de la citita sekcio, kiuj postulas sufiĉe multe da tempo, ankoraŭ ne estas finitaj, ni ne povas nuntempe publikigi iajn definitivajn rezultatojn. Ni nur povas jam nun sciigi, ke ni sukcesis ricevi de unu krakova Societo tutan domon kun puraj, konvene meblitaj ĉambroj, kie la loĝado dum ses tagoj kos-

tas nur 1.25. Tiun „hejmon“ ni rezervas ĉefe por neriĉaj studentoj. Espereble ni sukcesos ricevi por nia dispono ankaŭ la „Akademian domon“, en kiu estas oportune enloĝigeblaj pli, ol 100 personoj.




S-ro D-ro Ŝĉepan Mikołajski.

Unua viceprezidanto de Organiza Komitato de la Oka. Redaktoro-Eldonato de pola kuracista gazeto „Głos Lekarzy“ kaj esperanta „Voĉo de Kuracistoj“. Fama, energia politik-socia aganto en Lvovo.

*Mangado.* Konsiderante la fakton, ke inter la esperantistoj troviĝas sufiĉe multaj vegetaranoj, la Komitato faris kontrakton kun vegetarana restoracio, kiu fiksitis por kongre-

*Reklamo.* Oni organizas lum-bildajn paroladojn pri Krakovo por diskonigi nian antikvan kaj interesan urbon inter la fremdaj esperantisto. La paroladoj okazos en multaj landoj.



Krakovo. Katedralo ĉe kastelo „Vavel“.



Krakovo. Antikva Preĝejo de S-ta Kruco konstruita en XII jarcento.

sanoj, specialajn rabatitajn prezojn. La tut-taga manĝado kostos proksimume 80 — 90 sd. La ĉitita restoracio estos por la vegetaranoj des pli agrabla, ke ili povos tie interkompre-niĝi en Esperanto kun la mastrino kaj kun la servistaro.

*Oficiala subteno.* La Komitato sendis al la diversaj ministerioj kaj aliaj estraroj petoskrilbojn pri mona kaj alispeca helpo. La prezidanto prof. Bujvid jam du fojojn veturis al



Krakovo. La Nova Urba Teatro.

Wien, sidejo de centra registaro, intence por persone intervencii ĉe la ministroj. Speciale ekinteresiĝis pri la Kongreso, Lia Ekscelenco la Ministro por Galicio, kiu promesis ĉiurimede subtenadi la klopodojn de la Komitato.

Rondvojaĝon tra Svedujo, Norvegujo, Danujo, Germanujo kaj norda Aŭstrio faros s-o Wicherth el Charlottenburg, konata germana propagandisto kaj paroladisto. En Anglujo kaj Unuiĝintaj Ŝtatoj de N. A. parolos pri Krakovo nia eminenta oratoro s-o Edmond Privat kiu vizitinte nian urbon, estis profunde impresita pro ĝiaj belegaj antikvaĵoj.

*Akceptejo.* Ĝi estos aranĝita en la vasta kaj moderna domo de la „Komerca Akademio“, kies direktoro s-o Kannenberg, konata en Krakovo adepto de nia movado, bonvole donis ĝin je dispono de la Kongreso.

*Adreso.* La Komitato ankoraŭ unu fojon

atentigas, ke ĝia adreso estas **Kongreso Esperantista en Krakovo** kaj, ke ĉiuj korespondajoj, rilatantaj la Kongreson devas esti nur tiama-niere adresitaj.

*Peto.* Fine ni varme petas, ke ĉiuj, kiuj

intencas veni Krakovon, senprokraste sendu sian aliĝon kune kun la kongresa kotizajo, memorante, ke la preparaj laboroj postulas multe da mono.

*Loka Organiza Komitato.*

## Opinie wybitnych francuzów o Esperancie.

**G. Schibbyes**, Deputowany oficjalny Norwegji na VII Kongresie w Antwerpji:

Rząd norweski wydelegował mnie do wzięcia udziału w Kongresie Esp. Chciał on tym sposobem zmanifestować swoją gorącą sympatię i żywe zajęcie dla ruchu, który po latach walki, wbrew niechęci, szykanom i złej wierze, wykazał swoją rację bytu i nakazał sobie należytny szacunek.

Co się tyczy ważnej kwestji pokoju, którą się żywo zajmuje mój kraj, to zrozumienie potrzeby tegoż płynie potężną falą z państw rozleglejszych niż mój kraj, przekracza odległe brzegi Norwegji i coraz więcej pobudza naszą uwagę.

Kwestja jęz. międz. zkađinad jest tak ważną, że my nie możemy nie zainteresować się nią tembardziej, że służą tej sprawie ludzie dojrzałi, poważni, wielkiej wiedzy i posiadają-

cy wiarę w przyszłość swego apostołstwa. W naszych szkołach ogólnych i handlowych dzieci są obowiążane uczyć się pięciu języków, dla samoobrony przeciwko konkurencji, rodzice zaś słusznie sarkają na obciążanie umysłów młodego pokolenia tą nauką.

Norwegja jest krajem europejskim, może najwięcej odwiedzanym przez turystów. Wielu z nich już się posługuje Esper. i ztąd widzimy jak godnym podziwu i jakiej użteczności jest ten język. Nadszedł czas, kiedy należałoby zainstalować wszędzie konsulów esperanckich narówni z przedstawicielami innych państw korzystających z tych samych prerogatyw.

Składając dzięki za zaproszenie na Kongres, mam zaszczyt w imieniu rządu norweskiego złożyć wraz z uprzejmem pozdrowieniem serdeczne życzenia najszybszego rozwoju Esperanta.

## K o n s i d e r u !

...Naskigas saĝaj celoj, vekigas noblaj pensoj—kaj... ili renkontas sennombre multajn malhelpojn. Multajn el ili faras la socio mem tuta senbezone, nur pro senprudento, nur pro homa malperfekteco.

Se iniciaton de ia laboro aŭ instrua ĉu ekonomia institucio donas homo modesta, malforta, nekonata — tiam la socio ne fidas al li kaj ne donas al li nepran apogon. Sur fronto oni kutimis vidi homojn jam famajn kaj merititajn—sed tiuj ofte estas eluzitaj, ili elĉerpis jam sian energion aŭ ne konas novan sferon de la laboro kaj ne scipovas entuziasmiĝi de fremda ideo.

Al juna energio oni devas doni kondiĉojn kaj kampon por agado.

En nia socia opinio ekzistas multe da skeptikeco multe da kritikemo, tute senmotiva, fluanta el amara humoro, en senluziĝintaj fantazioj. Kaj dume la ago postulas la kredon, la amon kaj la esperon. Ĝi postulas fervoron. Ĝi postulas paciencon kaj persistecon. Individuo eĉ la plej saĝa, plej nobla falos—se la socio ne subtenos ĝin.

Kritiko estas nepra kaj ofte tre utilas. Sed ne ĉia kritiko. La kritiko kiu ne apogas sin je proksima konateco kun la afero, la kritiko, kiun ne naskis konsidero pri la problemo—estas agado malutila. Malkredo al ĉio estas veneno kaj paralizo.

Homoj malsanaj je ĝi devas foriĝi el la vivo por ne infekti ĝin per senforto.

La fervoro por socia laboro — estas ĉiam necesa. Sole el fervoro naskiĝas ago. Sen ago—estas mizera pereigo. Naskigi la fervoron povas nur varma amo. La homoj indiferentaj por ĉio estas haro en la laboro, en la vivo, ili estas pereigo de la nacio.

Vi memoru, ke se eĉ la ĉefan celon Vi ne sukcesus atingi—tamen Via laboro plifaciligas la triumfon al estontoj kaj alproksimiĝas ĝin. Do oni ne devas facile senfervorigi. Neniam forta peno ne perdiĝos vane. Ju pli multe da laboro, des pli facila ĝi estos en estonte.

Nenio sen pacienco kaj persisteco.

*Ludwik Straszewicz.*



## El Esperanta Mondo.

### Grava sukceso de Esperanto.

Jus aperis la oficiala raporto pri la en aŭgusto okazinta raskongreso en Londono. Oni plene raportas pri la faritaj paroladoj, el kiuj tiu de nia konata samideano Pollen elvokis grandan aplaŭdon. Al lia fervora agado ni ĉefe dankas la akcepton de jena rezolucio:

La unua universala raskongreso, konsiderante, ke ĝi celas alproksimigi la diversajn rasojn kaj naciojn de la mondo por pli bona komprenado kaj reciproka estimado, kaj tiel helpi al la plibonigo de la homaro, opinias, ke por tio absoluta unua kondiĉo estas, ke la diversaj rasoj kaj popoloj posedu krom siaj naciaj lingvoj duan lingvon, neŭtralan kaj komunan por ĉiuj, en kiu ilia individua spirito povos esprimiĝi, kaj kiu servos kiel spegulo de la universala konscienco; kaj, ĉar la kongreso opinias, ke tia lingvo ne plu estas projekto,

formu en siaj rondoj kaj landoj Esperanto-grupojn kaj societojn; kaj postulu de siaj registaroj la enkondukon de Esperanto en la lernejojn.

### Alvoko al ĉiuj lumoficiistoj.

La nacia franca federacio de la industriaj oficiistoj por gaso kaj elektra lumo intencas fondi internacian federacion inter ĉiuj naciaj federacioj aŭ similaj organizacioj. La celo estas krei amikajn interrilatojn por la morala kaj financa plibonigo de ĉiuj. Por sciigoj sin turni al s-ro Claverie, ĝenerala Sekretario de „Syndicat général du gaz de Paris“, Bourse du travail, 3, rue du Château-d' Eau, Paris.

### Internacia Ligo de Poŝtoficiistoj (Ildepo).

Poŝtistoj, Telegrafistoj el ĉiuj landoj, kunigu! En unueco estas forto! Forto de unuigo estas granda membraro! Kiel membrojn oni akceptas geoficiistojn ĉiurangajn de poŝto kaj telegrafo. La Liga organo „Poŝta Esperantisto“ aperas aŭ arte (ne plu kiel aldono de „La Esperantisto“) kaj enhavas vortaron speciale fakan en germana, franca, angla kaj esperanta lingvoj. Jara kotizajo: 1 Sm. Informojn donas la subskribinto.

### Prezidanto:

*Arnold Behrendl*, Supera Poŝtpraktikanto.  
Breslau 16, Maxstr., 22 (Germanujo).

Bohemaj Studentoj, Esperantistoj, deziras korespondadi por ilustr. postk. kun polaj studentoj, samideanoj.

### Liaj adresoj:

S-ro O. John, Louny, Hotelo „Amerika“ Bohemujo-Aŭstrio.

S-ro I. Novak, Praha II, Hopfenštokova 1—II Bohem—Aŭstrio.

S-ro S. Rambomek, Praha II, Sonkenicka-ĉis 15, Boh.—Aŭstrio.


S-ro D. Lad, Pardubice, Hronovic ul 640 Boh.—Aŭstrio.

S-ro F. Šmía, Bytonchov 100, p. Iizerodoli Boh.—Aŭstrio.

Universala manĝokarto en 6 lingvoj kunmetita de Ign. Tejchfeld, Varsovio, Jerozolimska 82. Prezo 10 kop. (sd.) por unu ekz. poŝta trasedo 2 kop. (sd.) por unu ekz.; por 5 ekz.—4; por 10 ekz.—6 kop. (sd.). En poŝtmarkoj aŭ respondkuponoj.

### Malĝojiga sciigo.

Ni ricevis sciigon, ke respektinda kaj meritaplena profesoro R. de S. en Genevo grave ekmal saniĝis je „reformemeco“ de nia lingvo. La malsano laŭ la medicina termino povas esti nomata „Jotofobio Antidus“; feliĉe la malsano



Krakovo. Jagelona Biblioteko de korta flanko.

sed finitu fakto, tial ke Esperanto estas tutmonde parolata de plej diversklasa elito, ĝi esprimas la deziron, ke ĝiaj membroj lernu kaj propagandu la internacian lingvon Esperanto,




Krakovo. Restajoj de antikvaj urbaj fortifikacioj.

ne estas tute infekta kaj dnfgera; ni esperas, ke ĝi rapide pasos kaj, kompatante la estimindan profesoron, ni deziras al li plej rapidan resaniĝon por bono de nia afero.

„Konkordo“.


Prof. R. de S. anoncas eldonon de la gazeto „Konkordo“ redaktota en reformita Esperanto laŭ la sistemo „Antido Nr. 2“ Konsiderante ĉi-tiun senutilan eĉ nocan agon kiel nova kaŭzo de *malkonkordo* en esperanta mondo, ni deziras al la eldonajo morton antaŭ la naskiĝo.



Oferdonaco por la Organizo de la VIII-a Kongreso en Krakovo.

S-ro D-ro *Karol Rothert* el Piotrków sendis al nia Redakcio Rb. 10 kiel mondonacon por la organizo de la VIII-a Kongreso,

Kiel Oficiala Organo de la Oka, ni kore dankas la oferdoninton pro lia sekvinda iniciato.



## F a k t y.

### Skomplikovana korespondencja.

Nasz współidejowiec p. R. M. z Drezna komunikuje nam bardzo charakterystyczny fakt, którego był naocznym świadkiem.

Zarząd dóbr i lasów księcia D. z Litwy potrzebował specjalnych maszyn do urządzenia fabryki według najnowszych wymagań. Specjalnością pewnej firmy w Saksonji w mieście M. są właśnie te maszyny i trzeba przyznać, firma ta cieszy się jak najlepszą opinią daleko po za własnym krajem. Zawiązuje się korespondencja w języku polskim.

Firma, wyjątkowo uprzejma, niestety, nie ma urzędnika, posiadającego język polski, i przesyła zredagowaną po niemiecku odpowiedź do przetłumaczenia na język polski do pewnej agentury w Dreznie. Agentura radzi sobie, przesyłając list do tłumaczenia do instytutu nauki obcych języków pana S. — Pan S., znając osobiście studenta politechniki p. M., radzi sobie z tym fantem w ten sposób, że

przesyła list do przetłumaczenia panu M. Pan M., upatrzawszy chwilę czasu, tłumaczy ów list, który tymi samymi przystankami wraca powrotną drogą do firmy, by wreszcie od niej powędrować pocztą na puszcze litewskie. Pan M., ma się rozumieć, nie może się zajmować tłumaczeniami darmo. Pan S. także darmo fatygować się niemyśli. Agentura jest od tego, by zarabiała, a firma w M. musi przecież z swymi kosztami ściśle się rachować, a zatem podobne korespondencje, przebywszy każdorazowo ze stratą czasu kilka instancji, muszą figurować w formie powiększonej cyfry w ogólnym rachunku.

Zupełnie inaczej wyglądałaby sprawa, gdyby zarząd dóbr posługiwał się międzynarodowym językiem Esperanto, który dzisiaj jest już w Saksonji tak rozpowszechniony, że żadnej firmie nie przedstawia trudności korespondencja w tym języku.

## Korespondajoj.

### Frateco inter la hungaroj kaj poloj, per Esperanto.

La 15-an de Januaro 1912 okazis grandega soleno pro la pola katolika preĝejo, konstruota en Budapeŝto. En la Budapeŝta malnova parlamento kunvenis tre grandnombra publiko kun konataj eminentuloj. Ĉeestis ankaŭ la urbestro de Budapeŝto.

Post la kantoj, kantitaj de la „Turul“ kantasocio, s-ro Giesswein, papa prelato, prezidanto de la „Hungarlanda Esperanta Societo“, faris paroladon, kun grandega sukceso.

Li rememoris pri la frateco, kiu jam antaŭ jarcentoj ligis la Hungarojn kaj Polojn. Ne ekzistas du aliaj landoj, kiuj pro la geografiaj rilatoj kaj pro la historiaj destinoj estus pli proksimaj, ol Hungarlando kaj Polujo.

Pli ol unufoje ni havis komunan reĝon. Ni batalis kune kontraŭ niaj komunaj malamik-

oj, kontraŭ la Turkoj kaj Tataroj.

Pola proverbo diras:

*Pol, Hungaro—frata paro  
Dum batalo—drink-regalo;  
Forta kapo, brava koro,  
Benu ilin, Di—Sinjoro!*

Sed ni devas esti fratoj ankaŭ ĉe la laboro kaj helpi unu la alian ĉe sociala evolucio.

La frateco inter ni, estas kvazaŭ malvarmigita. Ties kaŭzo estas, ke ni ne povas sin reciproke kompreni. Ni havas tute diferencajn lingvon. La hungara lingvo ne havas pa-

rencan lingvon. La Poloj ne konas la hungaran literaturon, kaj ankaŭ ni ne bone konas la ilian. La Hungaroj ne povas interrilati kun la Poloj.

Sed tiu ĉi jaro portos la eblecon de l' interrilatoj inter ĉiuj popoloj. En Krakovo en la ĉefurbo de malnova Polujo, okazos la 8-a mondkongreso de Esperanto. Centoj da hungaroj vizitos Krakovon, kaj ni esperas, ke dum la postkongreso, kiu okazos en Budapeŝto, ankaŭ la Poloj vizitos nin.

Kaj tiam ni devas renovigi la fratecon.

Poste la ĥoro „Turul“ kun granda sukceso kantis polajn kaj hungarajn kantojn.

La princo s-ro K. Lubecki parolis france pri la amikeco inter la Poloj kaj Hungaroj:

„La preĝejo, kiun la gastamantoj Hungaroj konstruos, por la konservado de l' religia vivo de



Krakovo. En urba ringĝardeno „Planty“.

la polaj fratoj, estos la sigelo de l' firmiĝo de amikeco“.

Li prezentis ankaŭ la historion de la Poloj per belaj lumbildoj.

Enfine s-ro d-ro Julio Barański dankis princon Lubecki por lia parolado. Li memorigis, ke la urbestro de Budapeŝto, s-ro d-ro Bárcezi promesis senpagan bienon por la preĝejo.

La sukceso estis grandega, multfoje akklamata la partoprenantoj kaj de la Poloj.

Budapeŝto

L. V. St. Nikolao Kaposi.

En 1912 jaro „POLA ESPERANTISTO“ aperadas regule ĉiumonate en lora pligrandigita amplekso kun ilustraĵoj. La programo estas plivastigita kaj plidiversigita.

JARA ABONPAGO: afrankite r.b. 2.50 = „S“ 2.65 kun „LITERATURA ALDONO“.

Adreso: WARSZAWA, la Redakcio — Włodzimierska 8, la Administracio — Koza 20.

## Kroniko.

## Varsovio.

25-on de Januaro okazis kunveno de Varsoviaj samideanoj. La kunvenon malfermis prezidanto de la Societo. S-ro A. Grabowski Li parolis pri vigla pulso de esperanta vivo en la tuta mondo kaj pri plej diversaj aplikoj de Esperanto en internacia komunikiĝo, komerco, industrio.

Poste S-o Leo Belmont vere arte kaj kun granda forto deklamis unu scenon el „Maze-po“ trad. de S-o Grabowski.

La ĉefa atrakcio de la vespero estis prelego de simpatia gastodocento S-o Edmond Privat, kiu rakontis prisiaj impresoj dum peresperanta vojaĝo tra Eŭropo kaj Ameriko. Li substreksis grandan utilecon de U. E. A. kiu pere de diversurbaj konsuloj kaj delegitoj helpas al ĉiuj membroj de U. E. A. ĉu dum vojaĝo, ĉu korespondante.

La prelegento alvokis kaj varme konsilis enskribiĝi en tiun meritoplenan kaj tre gravan por nia afero institucion.

S-o Privat estante en Petersburgo vizitis premier-ministron Kokovcev, kiu donis al li favorajn respondojn koncerne la aferon de kap, Postnikov, kiun la rusa registaro ne identas kun la esperanta afero, permesante denove malfermi fermitajn filiojn de „Ruslanda Ligo“.

S-o Kokovcev promesis al S-o Privat sendi al svisuja-rusa konsulo respondon pri la rilato de la rusa registaro al Esperanto—kion li faros post interkonsiliĝo kun la aliaj ministroj.

Enhavoriĉan prelegon de esperanta Demosteneno multveninta publiko dankis per bruaj aplaŭdoj.

S-o Belmont improvizis humoroplenan humoraron, kiu elvokis aplaŭdon de ĝajgita publiko.

Enfine nia amata Majstro, ĉeestanta la kunvenon—dankis por „vivu“—krioj, kiuj eksplodis en la entuziasmoplena atmosfero. Amika vespermanĝo kun gesinjoroj Privat—ankoraŭ plifortigis bonan impreson kaj gravuriĝis en memoroj de ĉeestantoj simpatiajn gastejn gesinjorojn Privat.

## Patriotismo kaj Esperanto.

19-an de Januaro en la Societo de Literaturistoj kaj Ĵurnalistoj prelegis pri suprenomita temo s-o A. B. Brzostowski. Li koniĝis al multaj aŭskultantoj—plejparte reprezentantoj de Varsovia gazetaro—grandan kaj ne-

refuteblan bezonon kaj utilecon de lingvo internacia. La preleganto batalis kontraŭ ĉe kelkaj ekzistanta opinio, ke Esperante minacas la patriotismon kaj tial ni, poloj, devas ĝin ingnori aŭ kontraŭbatali. S-o Brz. kulpigis polan gazetaron, ke ĝi rilatas indiferece aŭ ma'amike al nia bela ideo. La plendojn kaj akroformajn riproĉojn penadis refuti Red. de „Kurjer Polski“ S-o L. Straszewicz, dirante, ke oni neniel povas kulpigi la tutan gazetaron; se la gazetoj (almenaŭ plejparto) ne skribas pri Esperanto, tio estas, laŭ li kulpo de esperantistoj, kiu ne informas la redakciojn pri Esperanto, aŭ kulpo de malagrabla kaj teda ilia propagandmaniero.

S-o Belmont tre prave opiniis, ke ne patriotismo estas malamiko de Esperanto sed nur socia apatio, maldiligenteco kaj ĝenerale indiferececo por tutmonda kultura movado.

Iom tro longa prelego elvokis varmajn diskutojn. Unuj opiniis, ke Esperanto nur kiel komerca interkomprenigilo estas aprobinda, aliaj esprimis timon, ke Esperanto iom post iom eniĝos en polan lingvon kaj difektos ĝian purecon.

Al tiu riproĉo, farita de S-o Pruszyński, red. de popola gazeto „Gazeta Świąteczna“ tre sprite respondis S-o Belmont, kiu citis vortojn latindevenajn, uzitajn de S-o P. dum kelkminuta pola parolo—nome: prelegento opo- nuro, argumento, civilizacio, inteligentia, kulturo, abstrakta k. al., plej bone pruvante per tio, ke tia „malpurigo“ tute ne difektas, sed kontraŭe, pliriĉigas polan lingvon.

Aliaj riproĉoj kontraŭ literatureco de Esperanto brave kontraŭbatalis S-o Grabowski kaj Belmont. Kvankam oni faris nenian rezolucion sed tamen ĝenerale sentiĝis simpatio por nia afero.

Ni sentas agrablan devon danki S-on B., ke li provis moviĝi polan gazetaron kaj turnis ĝian atenton sur nian ideon. Tio estas lia granda kaj laŭdinda merito.

Veran surprizon faris al ni ĉiutaga gazeto „Głos Warszawski“, kiu en malsaĝa artikolo kun naivaj motivoj kontraŭbatalas esperantistan kongreson en Krakovo, kaj ke la malsaĝan artikolon avide represis „Kurjer Warszawski“ S-o A. Grabowski respondis al la artikolo, sed lia respondo ne trov-

is lokon sur la kolcnoj de ŝovinizma gazaĉo.

La respondon ni represas ĉi sube:

Redakcja „Głosu Warszawskiego“ w № 19 swego pisma umieściła artykuł p. Amicusa alarmujący opinię polską z powodu przyszłego VIII Wszechświatowego Kongresu Esperantystów, mającego się odbyć w sierpniu r. b. w Krakowie. Ponieważ artykuł ten wymaga niezbędnie pewnych wyjaśnień, których umieszczenia „Głos Warsz.“ odmówił, więc niżej podpisany prosi uprzejmie Szanowną Redakcję zaszczytnie znaną ze swej bezstronności, o wydrukowanie ich w swoim poczytnym piśmie:

